

BRIGHTON-a Bulteno



ESPERANTO-SOCIETO DE BRIGHTON KAJ HOVE

JAN - MAR 1983

VOJAĜOS AL ROUBAIX

Dum januaro nia ano John Roberts intencas gvidi rapid-kurson por komencantoj en la kolegio New England (Arundel), kaj samtempe aranĝi por ili ekskursojn, por ke ili ekzercu kaj spertu la lingvon. John, kiu estas asocia profesoro pri internaciaj temoj, skribas jene:

"La studentoj ricevos du stud-horojn ĉiutage. Ni intencas sekvi la bazan kurson de Audrey Childs-Mee dum unu horo kaj post hora paŭzo okupiĝi pri la sonbendo de 'Jen Nia Mondo' kaj diversaj aliaj aferoj, kiel ludoj aŭ kantoj. Je la fino de la unua semajno ni vizitos la Londonan Klubon, je la dua la Societon de Brighton kaj Hove, kaj dum la tria ni veturos en minibuso trans la markolo ĝis Roubaix. Dum restado tie ni povus renkonti grupojn francajn aŭ belgajn por paroli la novan lingvon. Ĉar necesas montri la eblecojn al novuloj mi serĉos ankaŭ eksterlandajn korespondantojn.

Ĉe Arundel la 200 studentoj venas el pli ol 30 landoj, do ni havas bonajn eblecojn por

internacia kompreno, kaj la kolegio celas eduki, inter aliaj, por mondĉivitaneco. La pli granda studenta parto estas 18- ĝis 22-jaraĝaj, kaj ili sekvas kvarjaran kurson, precipe en angla lingvo, internacia administrado aŭ politika scienco."

Ilia vizito al nia klubo okazos la 14-an de januaro - vidu la programon.

● Our member John Roberts is to give an Esperanto course at the New England College, Arundel, in the new year. After the first week (at 2 hrs/day) they will visit the London Esperanto Club; after the second week they will come to our club, and after the third week they will visit Roubaix in France.



MILPUNDA MARATONO

Estro de Hove Adult Education, Roger Kenward, sukcesis enspesigi ĉ. £1200 por subteni niajn vesperkursojn. Li kuris maratanon de 26½ mejloj kaj antaŭpetis de siaj studentoj mongarantiojn por ĉiu mejlo.

Kvankam li neniam entreprenis ion tian antaŭe, li sukcesis kuri la tutan distancon en 3 horoj 20 minutoj. Li komencis en Grand Avenue, Hove, kuris norden al Poynings, daŭrigis al Upper Beeding, Lancing, kaj ree laŭ la marborda strato al Hove.

El Brighton & Hove Leader, septembro 30, antaŭa paĝo:

Talking Esperanto

INTEREST in the artificial language Esperanto appears to have revived in the Brighton and Hove area.

Helen Fantom, who has a class in the language starting at the Adult Education Centre in Connaught Road, Hove, tomorrow, said: "We are getting a lot more inquiries from people wanting to learn than we did a year ago."

By contrast, some of the French language courses are failing to attract students and some may have to be discontinued. Alison

Minns, who teaches French at the same centre, reported: "I usually have around 25-30 in my class, but so far numbers are only up to eight. I understand that most language courses have been affected in the same way. It is a bit of a puzzle because fees have not gone up this year."

An education authority spokesman said enrolments were down generally throughout the county. "We think language courses have been hit particularly hard because fewer people are planning holidays abroad next year," he said.

PROGRAMO JANUARO - MARTO 1983

Kunvenoj estas en la Connaught Centre, Hove, escepte se estas alie indikite. Klubvesperoj estas en ĉambro 10; kurso por komencantoj en ĉambro 7.

Meetings are in the Connaught Centre, Hove, unless otherwise indicated. Club evenings are in room 10; beginners' course is in room 7.

JANUARO 14

KASTELO GRESILLON

WILF CARRICK

montras lumbildojn kaj

priskribas la Esperanto-Domon.

JANUARO 21

GERRY KAJ LILLIAN BENNETT

KELKAJ HUMURAĴOJ

JANUARO 28

IAN FANTOM

BIBLIOTEKOJ DE LA
ESTONTECO

FEBRUARO 4

BARLASTONO

HILARY GILMORE

informas pri

la rezidkurso en Nordanglio

FEBRUARO 11

WILF CARRICK

PISANICA, BULGARIO

FEBRUARO 18

NENIA KUNVENO

(MEZTRIMESTRA FERIO)

FEBRUARO 25 JARKUNVENO

Proponojn por funkciuloj aŭgagadoj

bv. sendi al la sekretario.

(7.00-7.30 konversacio;

7.30-8.00 jarkunveno;

8.15-9.00 diskuto)

MARTO 4

KOMENCANTO

INSTRUAS KOMENCANTOJN

JOHN ROBERTS

raportas pri sia unumonata

kurso en Arundel.

MARTO 11

RHODA MAY

VIVOJ DE VAN LOON

MARTO 18

HEJMAJ KOMPUTEROJ

REG FIDLER

demonstras sian propran
mikrokomputeron.

MARTO 25

SINGAPURO KAJ NOV-ZELANDO

BEATRICE CLARKE

rakontas pri siaj vojaĝoj.

APRILIO 1

NENIA KUNVENO

APRILIO 8

NENIA KUNVENO

APRILIO 15

VIZITO AL NOV-ZELANDO

KAJ AŬSTRALIO

MARGARET KENNEDY

rakontas pri siaj vojaĝoj.

GASTPRELEGO

MARTO 18:

HEJMAJ KOMPUTEROJ


REG FIDLER

klarigas pri sia ŝatokupo,
kaj demonstras sian
propran mikrokomputeron.

Prelego komenciĝos
je la 7a horo.

Post la paŭzo: demandoj
kaj diskuto.

Enirprezo: 50p.



THE CONNAUGHT CENTRE, HOVE

REGULA PROGRAMO
Vendredvespere

REGULAR PROGRAMME
Friday evenings

Komenca kurso

19.00 - 20.45

Beginners' course

Konversacia grupo

19.00 - 20.00

Conversation group

Kafpaŭzo

20.00 - 20.15

Coffee break

Laŭ la programo

20.15 - 21.00

See programme

MIRIGA MONDO DE MINIATUROJ

Kiam nia gastpreleginto Karlo Bartoŝik prelegis la 19-an de novembro, niaj anoj estis mirigitaj de "kute alia mondo" (kiel poste priskribis ĝin nia prezidanto Wilf Carrick) de juvel-farado.

Aldone al la pli konvenciaj stiloj de ringoj kaj ornamaĵoj Karlo montris lumbildojn de funkciantaj modeloj miniaturoj faritaj el oro, stano kaj juvelŝtonoj. Piloĵoj en la formo de rubujetoj kaj valizetoj, kaj cigared-fajriloj kvazaŭ kametubetoj trovigis inter la pli avangardaj el la eroj montritaj. Unu ero estis farita por la geprincoj Charles kaj Diana, komisiita de orkestro kies patrono la princo estas. Tre taŭge li faris violoncel-valizeton.

Aldone al montri lumbildojn, Karlo ankaŭ ekspoziciis diversajn rubujetojn, kametubetojn kaj aliajn objektojn, kiujn la anoj povis fingrumi dum la paŭzo.

Karlo alvenis en Britio en la jaro 1967 el Ĉeĥoslovakio. Liaj denaskaj lingvoj estas Esperanto kaj la nederlanda (kvankam li insistas ke li poste forgesis ambaŭ kaj devis relerni ilin el lernolibroj). Lia tria lingvo estas la ĉeĥa - lia patro estis ĉeĥo kaj lia patrino nederlandanino kaj la hejma lingvo estis Esperanto. Nun li havas polan edzinon, Lucia, kaj kvinmonatan bebon, Olivia.

Kelkaj el liaj artaĵoj estas nun videblaj en Brighton - en la antaŭnelonge malfermita butikoj Smart Arts (26 Sydney St, BN1 4EP). Tamen kiam vi vidos la prezojn ne miru; ĉio estas detale manfarita - eĉ la interna meĥanismo de la cigared-fajriloj!

SUKCESO EN EŬROPO

S-ro M Seligman, ano de la Eŭropa Parlamento por Okcidenta Sussex, anigis al la nove fondita Eŭropa Paramenta Esperanto-Grupo, kies fonda kunveno okazis la 27-an de oktobro en Strasburgo.

Tiel informis Brian Barker en Londono, kiu organizas la

premagadon por starigi parlamentan agadon. La membraro de la nova grupo estas 12, kaj Brian opinias, ke ĝi daŭre kreskos, dum Esperanto-asocioj en aliaj landoj plispertigos en la premagado.

En Strasburgo mem kunveno estis anoncita por kontraŭi Esperanton. Ĝi devis esti komencinta duonhoron antaŭ la Esperanto-kunveno, sed neniu alvenis.

Norah Dale

F-ino Norah Dale, prezidanto de la Esperanto-Grupo en Worthing, mortis la 5-an de novembro je aĝo 66.

Ĉe ŝia humanista funebro la 19-an de novembro reprezentis la esperantistojn Wilf Carrick, kiu dum kelkaj minutoj alparolis la ĉ. 50 ĉeestantojn. Li diris, ke kvankam Norah estis esperantistino dum multaj jaroj, ŝi faris multon rilate al TUCEG (la sindikata kaj kooperativa Esperanto-Grupo) kaj havis multe da amikoj en la oriento kaj en Eŭropo. Ŝi estis membro de la

bonfara asocio kiu subtenas la Kastelon Grésillon. Ni multe sentas mankon de ŝi, Wilf diris, ĉar ŝi estis kvazaŭ motoro kiu antaŭenigis konon de Esperanto en la regiono. Ŝi estis agemulino.

Norah lernis Esperanton antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj de f-ino Agnes George, kaj daŭrigis en Barlaston kaj Grésillon. Antaŭ ol ŝi multe scipovis la lingvon ŝi komencis agi pri la lingvo, kaj tio estis bona, Wilf diris, ĉar alie ŝi ne estus sukcesinta fari ĉion kion ŝi fakte faris.

Norah restis aktiva preskaŭ ĝis la fino.

El Meridian Post, 1982 okt/nov
(Komunuma gazeto de Peacehaven)

NATION SHALL SPEAK...?

Brighton's Mayor, Councillor Geoffrey Theobald attended the Inaugural Meeting of the Esperanto-Society of Brighton and Hove which hopes to extend its activities beyond the boundaries of Brighton and Hove and to instigate Regional Meetings or Conferences. A speaker at the inaugural meeting which was held on the 18 September at The Royal Pavilion was the well-known linguist Dr. J. C. Wells, Lecturer in Phonetics at University College London whose talk was entitled "Why Esperanto?" Dr. Wells, a strong advocate of Esperanto as an international language, has also acted as a linguistic adviser to the BBC. Peacehaven has at least two Esperantists in its area - W. F. Knight who has contributed an article on a different subject (namely, rates) to this issue of *Meridian Post* and Bertram Russell, this issue's editor. Bertram is a member of the Universal Esperanto Association and has earlier conducted classes in the language. He is currently exploring the possibility of setting up a Peacehaven Esperanto Group and as a preliminary hopes to give a lecture on the language in the town if sufficient interest is shown. Readers who would be interested in hearing such a lecture or would like to participate in an instructional course if organised are asked to let Bertram Russell know this. It may be possible to arrange for both an afternoon course, for older residents and non-working housewives and an evening course for others. Write to Bertram Russell, c/o *Meridian Post*. Letters addressed in this manner can be left at the Information Desk at the Meridian Centre.

● En la ĉefbiblioteko de Hove estos Esperanto-ekspozicio de la 24a de januaro ĝis la 5a de februaro 1983.

Fariĝu fora ano

Ĉu vi deziras ankaŭ estonte ricevi ĉi tiun Brighton-an Bultenon? Kiel vi vidas de interne, ni havas vialan programon, kun okaza gastprelego. Estonte ni esperas organizi ankaŭ 'regionajn kunvenojn' - kiuj versajne okazos sabat-posttagmeze - kaj certe tiaj kunvenoj alonos homojn el la tuto de Sussex, kaj eĉ de preter ĉiaj limoj. Ĝuste tia kunveno estis la Inaŭguro de la Societo.

Tamen estas aliaj kialoj resti en kontakto kun Brighton. Brighton estas konferenca urbo kaj jam en ĉi tiu eldono oni povas legi pri kongreso kiu akceptis rezolucion pri Esper-

anto. Iuj eĉ parolas pri la ebleco de Universala Kongreso en Brighton.

Kvankam ne ekzistas formala kategorio 'fora ano' (la kotizo por ĉiuj estas £1), fakte la lokaj anoj faras aldonajn kontribuojn en la regulaj kunvenoj. La kotizo do celas kovri nur la bazajn elspezojn. Ju pli da (foraj) anoj ni havos, des pli bonan kaj regulan Bultenon ni povos provizi - kaj des pli ni povos helpi vigligi la movadon en la tuta regiono. Do, se vi deziras, kaj se vi ne jam faris, kial ne tuj sendi vian kotizon al nia kasisto, kies adreso troviĝas sube?

Leteroj

Pro la sezon-alterno ŝanĝiĝis la frekvencoj kaj ondlongoj de nia elsendo. Ekde la 30a de oktobro ni alprenos novajn frekvencojn kaj ondlongojn. Ĉi-kune ni sendas al vi la novan horaron de nia elsendo. La Esperanta elsendo de Radio Pekino daŭras jam 18 jarojn. Dank' al la fervora subteno kaj helpo de niaj aŭskultantoj ĝi progresas. Ni varme bonvenigas vian raportoj al ni pri la aŭdebleco de nia elsendo kaj informi al ni, kiuj programoj plaĉas al vi kaj kiajn vi deziras aŭskulti. Ĉiuj viaj sugestoj kaj proponoj estas utilaj al nia laboro. Ni kore dankas vin.

Kun bondeziro vin salutas
Esperanto-Sekcio de Radio Pekino.

Horaro de la ĉiutaga esperanta disaŭdigo de Radio Pekino: Al Eŭropo 20:00 - 20:30 GMT 40.1; 32.0; 30.1m (7470; 9365; 9965 kHz)

● Two members of our course at the Connaught Centre are organising a party to the weekend course in Ipswich (Feb 25-27). Anyone interested should contact Christine Wieting (9 Picton Street, BN2 3AP) or Edward Griffiths (3 Southdown Avenue, BN1 6ES, tel. Bn 505780).

NIAJ NAJBAROJ

ARUNDEL Kurso por studentoj de New England College. Informas J Roberts, Littlehampton 3299.

HASTINGS Esperanto-Grupo kunvenas la unuan merkredon ĉiunonate (escepte de aŭgusto) ĉe Ses-roj F Maitland, 74 Saxon Rd (tel. 0424 440 981) ekde 7.30 p.m.

WORTHING Esperanto-Grupo kunvenas merkredvespere (sed nur dumtrimestre) 7-9a horo en Worthing Adult Education Centre, Union Place (kontraŭ Connaught Theatre). Informas John Harrison, Flat 8, Stoke Court, Abbey Road, Worthing, BN11 3RW.

Informis UNA

La loka filio de Asocio por Unuiĝintaj Nacioj informis nin pri prelego kiun nia ano John Roberts prezentis al ili la 26-an de novembro, kun la titolo "The Crisis System" (La Krizosistemo?).

Kvankam tiu prelego koincidis kun nia klubvespero, estas bone tiel interŝanĝi informojn. Pliajn detalojn pri UNA oni povas ricevi de ilia sekretario, Mrs Nancy Dore, Bn 501370.

● Hilary Gilmore informas, ke ŝi skribis al Roy Plomley de la BBC-programero Desert Island Discs, kaj sugestis, ke li invitu William Auld kiel sian gaston.

KALENDARO

83 jan 29: Hastings (Sussex)
Luda posttagmezo.
K Hadler, 0424 422427.

83 feb 25-27: Ipswich (Suffolk)
Kursosemajnfino (3 niveloj).
F Dunbar, 0473 44211.

Mar 20: Haywards Heath (Sx)
Sudorienta Federacio
R G Fidler, Hay. Hth. 413937

83 apr 1-4: Manchester (Lancs)
BRITA KONGRESO DE ESPERANTO.
EAB, 01-727 7821.

83 apr 30-maj 2: Folkestone (Kt)
MARKOLA KONGRESO.
S-ino M Buckle, Maidstone 26548.
Hotelo Southcliff, 0303 56075.

83 jul 9: Alfriston (Sussex)
Drusillas Zoo Park
(kun infanludejo).
K Hadler, 0424 422472.

Aŭg 7: Barlaston (Staffs)
6-taga kurso je ĉiuj niveloj
EAB, 01-727 7821.

ELDONITA DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRIGHTON KAJ HOVE

Prezidanto: Wilf Carrick, 90a Carlyle St, Bn. Bn 695525.

Vicprezidanto: s-ino H M Fantom, 23 Kingston Lane, Southwick. Bn 594227.

Sekretario: Hilary Gilmore, 12 Terminus Rd, Bn. Bn. 24818.

Kasisto: s-ino R F May, 88 Donald Hall Rd, Bn. Bn 684345.

Informoficisto: I D Fantom, 23 Kingston Lane, Southwick. Bn 594227.

Kontribuojn por la Bulteno bonvolu sendi al la informoficisto.

Kotizojn bonvolu sendi al la kasisto (£1 por ĉiu).